Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Lundo, la 8-a de julio 2019

*N-ro 3*

## Saluto de la ministro Linas Linkevičius



**Estimataj,**

Elkore mi salutas vin, kolektiĝintajn el la tuta mondo por partopreni en la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Litovio aprezas kaj alte taksas ĉi tiun amikan reton da senlacaj entuziasmuloj, kaj fieras pri siaj longedaŭraj ligoj kun la esperantista movado. La nuna jaro por Litova Esperanto-Asocio estas ekskluziva – ĝi festas centjariĝon de sia fondiĝo. Mi ĝojas, ke ĉi tiun impresan datrevenon ni povas festi kune.

La kreinto de Esperanto, la fama litova Ludoviko Lazaro Zamenhof, estis vera idealisto kaj viziulo, destininta por la lingvo Esperanto grandajn celojn. Laŭ li, ĉiuj homoj devus strebi al la plej alta celo, krei harmonian homaron: „Ni aspiras krei neŭtralan fundamenton, surbaze de kiu diversnaciaj homoj povus pace kaj frate interkomunikiĝi, ne altrudante al la aliaj siajn naciajn diferencojn“. Ĉi tiu Zamenhofa citaĵo ne perdis sian aktualecon, kaj strebado al paco, al interpopola kompreniĝo kaj komunikiĝo precipe gravas en la hodiaŭa mondo.

Permesu bondeziri al Vi enhavoriĉajn kaj inspirajn renkontiĝojn, ankaŭ agrablajn impresojn dum via gastado en Litovio.

**Linas Linkevičius**
Litovia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj

## Programo

### La 9-a de julio (mardo)

**7.00–8.00:** Matenmanĝo – la unua alterno
**8.00–9.00:** Matenmanĝo – la dua alterno
**10.00–11.00:** Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (ĉambro 117)
**10.00–11.00:** Prelego de prof. Amri Wandel pri spacteleskopoj (ĉambro 204)
**10.00–11.00:** Prelego de d-ro Gabor Markus „Enmigrado en Eŭropon kaj la Eŭropa dilemo“ (ĉambro 118)
**10.00–12.00:** Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (ĉambroj 303-311)
**11.00–12.00:** Prelego de prof. Ilona Koutny „Esperant-lingva bildo de la mondo“ (ĉambro 117)
**11.00–12.00:** Prelego de Yves Nevelsteen „200 + Esperantaj marknomoj en Beneluksο“ (ĉambro 124)
**11.00–12.00:** Prelegserio de prof. Walter Żelazny pri religioj: la tria prelego (ĉambro 118)
**11.00–12.00:** Prelego de Vytautas Šilas „La unua periodo de Litova Esperanto-Asocio“ (ĉambro 205)
**11.00–12.00:** Kvizo „Kiu estas sur la ekrano?“ Gvidas Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov (ĉambro 204)
**12.30–13.30:** Tagmanĝo – la unua alterno
**13.30–14.30:** Tagmanĝo – la dua alterno
**15.00–16.00:** Prelego de d-ro Orlando Raola „Kemio kaj mediprotektado en la hidrosfero“ (ĉambro 118)
**15.00–16.00:** Prelego de Anna Striganova „Fabela Antagonisto aŭ iom pri ŝato al malbonaj herooj“ (ĉambro 117)
**15.00–16.00:** Prelego de prof. Gong Xiaofeng „Kapabligo de transkultura komunikado kaj Esperanto-instruado/lernado“ (ĉambro 124)
**15.00–17.00:** Seminario de Pavla Dvořáková „Ĉu muziko povas kuraci?“ (ĉambro 204)

# Saluto de la urbestro Rytis Račkauskas



## Estimataj esperantistoj,

Mi salutas vin, venintajn al la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Mi ĝojas, ke ĉi-jare Vi renkontiĝas en nia urbo.

Mi esperas, ke enhavoriĉe pasigita tempo ĉi tie havigos al Vi plej belajn emociojn kaj postlasos ĉarmajn rememorojn.

Agrablajn renkontiĝojn, serenan humoron

kaj belegajn impresojn en Panevėžys!

Estime,

**Rytis Račkauskas**

**16.00–17.00:** Prelego de prof. Aleksandr Melnikov „Leksikaj novismoj kaj neologismoj: *anatemi* aŭ *odi*?“ (ĉambro 117)

**16.00–17.00:** Prelego de Dima Ŝevĉenko „La Reta Revuo. Kio ĝi estas?“ (ĉambro 124)

**16.00–17.00:** Prelegciklo de prof. Walter Żelazny pri sociologio de la Esperanto-movado: la dua prelego (ĉambro 118)

**16.00–17.00:** Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja (ĉambro 206).

**16.00–17.00:** Koncerto de Kaŝi kaj Halina Kuropatnicka-Salamon, la vroclava nevidanta poetino (ĉefsalono)






**17.30–18.30:** Vespermanĝo – la unua alterno

**18.30–19.30:** Vespermanĝo – la dua alterno

**20.00–21.00:** Koncerto de Amira Chun. En la urba komunuma centro (Kranto str. 28. Salono de Aranĝoj)



# Manĝmenuo por BET-55

**La 3a tago, mardo** (2019-07-09)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kaĉo el avenaj flokoj | 200 g |
| | Bulketo | 60 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Brasika supo | 250 g |
| | Fritita fiŝo | 100 g |
| | Porka bifsteko | 100 g |
| | Kaĉo el hordea grio | 100 g |
| | Salato el freŝaj brasikoj, karotoj, freŝaj legomoj | 80 g / 20 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Bakaĵo el kazeo kun konfitaĵo, kremo | 150g / 40 g |
| | Kotleteto el kokaĵo | 75 g |
| | Kuiritaj legomoj | 100 g |
| | Teo | 200 g |

# Esperanto-vilaĝo en la pola festivalo Pol'and'Rock

**Du semajnojn post BET-55, de 1-a ĝis la 3-a de aŭgusto, okazos jam la 25-an fojon en Kostrzyn, Pollando, grandega rokmuzika festivalo, antaŭe nomata Woodstock, ekde la pasinta jaro Pol'and'Rock-Festivalo. Pasintjare ĉeestis ĝin 600.000 homoj el multaj landoj de la mondo!**



La festivalo rilatas al la bonfara organizo de WOŚP, Wielka Orkiestra Świątecznej Pomocy (Granda Orkestro de Kristnaska Helpo), kiu kolektas monon por helpi kuraci kormalsanojn, hospitalojn por novnaskitoj, onkologiajn pacientojn, malsanajn infanojn, maljunulojn... WOŚP rekompence organizas la rokmuzikan festivalon kun senpaga eniro – kaj muzikaj grupo el la tuta mondo, kie oni ne trinkas alkoholaĵon!




Kiel en la antaŭaj jaroj, denove okazos en ĝi "Esperanto-vilaĝo", organizata de polaj esperantistoj. La 20-persona teamo de mateno ĝis vespero laboros por informi kaj reklami pri Esperanto.



La rikolto estos abunda, ĉar kursojn de Esperanto, gvidatajn de Stano Marček 3-foje tage, denove allogos grupojn de entuziasmuloj, kiuj dum 2-horaj lecionoj diligente lernos Esperanton!



Alia furaĵo estos prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado tra la mondo, Esperantaj koncertoj, ludoj, desegnado...

Pliaj informoj: *halinakomar@gmail.com* aŭ *http://www.gazetaro.org/polandrock/*

**Estimataj,**

Mi elkore gratulas la organizantojn de la BET-55 kaj ankaŭ ĉiujn partoprenantojn, okaze de la malfermo! Sukcesojn, bonhumoron kaj feliĉajn festotagojn al vi, miaj karaj!

Mi ege bedaŭras pro mia malesto en tiu belega aranĝo. Mi kaj ankaŭ du personoj de mia lando ege volis esti kune kun vi ĉiuj en tiuj belegaj tagoj.

Domaĝe, ke post longaj klopodoj ni ne povis ricevi la vizojn.



Eble venontfoje ni festos kune kun vi dum la sekva BET. Ni esperu!

Amike, bondezire kaj altestime **Gafur Mirzo**,
prezidanto de UzEA,
Uzbekio


# Kantoj por kursoj

## Ĉu instrui kantojn en niaj Esperanto-kursoj?

Lernantoj en niaj Esperanto-kursoj ofte laciĝas post kelkhora laboro. Tamen, se la kursgvidanto fine de la kurso prenas gitaron, aŭ eksidas apud piano, kaj instruas al la kursanoj belajn Esperanto-kantojn, ili vigliĝas kaj lernas plu: per amuza kaj gaja maniero ili lernas kaj parkerigas tekstojn de la kantoj – kaj foriras el la kurso gajaj, kantante...

Dum BET-55 Stano Marček instruos, kadre de la kurso A1 por komencantoj (3-a etaĝo, ĉambro 305), 10 minutojn antaŭ la fino (projekciante la tekstojn, kun gitaro) dekon da facilaj Esperanto-kantoj, konvenajn por niaj kursoj. – Povas veni ankaŭ aliaj kantemaj inteteresiĝantoj!

La disko (kun la tekstoj) estas aĉetebla sur jena KD, en la klaso, post la kurso, aŭ en la libroservo (ĉambro 112).




# Koncerto de Natalia Bertse

Mi komencu rakonton de vortoj, diritaj de Nataŝa mem meze de koncerto kaj bazitaj sur unu el la kantitaj de ŝi kantoj. "Ni ĉiuj nun estas en nia verda trajno, iu aĉetis bileton por tago, iu por monato, iu por vivo..."



– sed tiun kanton ja ni ĉiuj konas, ĉu? Nataŝa elektis por la koncerto kantojn de sia Esperanto-juneco, tiujn, de kiuj por ŝi komenciĝis la Esperanto-vivo.

Mi kun rideto pensis dum la tuta koncerto, ke ankaŭ mi povas nomi tiujn kantojn – "kantoj de mia Esperanta juneco". Kiam mi unuafoje ekaŭdis ilin ĉiujn, mi ankoraŭ ne komprenis Esperanton, kaj, sincere dirante, mi parkerigis duonon de ili antaŭ ol mi komencis vere paroli Esperante.


Nu, laŭ la bone aŭdebla zumado de la kunkantanta halo, kiu interalie estis plenplena, pli-malpli ĉiuj pensis same kiel mi ;)

**Anna Striganova**

# Komuna kantado la himno

Sabate vespere, post la koncerto de Natalia Bertze, okazis en la ĉefsalono, kiel anoncite en *Abelo* 1, komuna kantado de la Himno de Litovio (Nacia Glorkanto).

# Pardonpeto pro la eraro




**En la hieraŭ aperigita anonco pri la nova eldono, korektita kaj ampleksigita, de *Baza Literatura Krestomatio*, eldonita de *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio, aperis eraro: Normala prezo estas 27 eŭroj, sed la speciala unuataga prezo (dum BET-55 kaj la 104-a UK) estas 13,50 eŭroj.**

## Ĉu vi volas kontribui al *Abelo*?

En ***Abelo*** vi trovas aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-55, fotojn k.s. La enhavo dependas ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu la kontribuojn en tiucelan ☚ skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com*. Ankaŭ kvalitaj fotoj estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj.




**Stano Marček, via redaktoro**

 Lastmomenta sciigo: filmo pri la unuaj momentoj de BET-55 spekteblas ĉe *https://youtu.be/j0La8g-p2lU*